

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №5



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №5 (271)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 65-66.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №5 (271).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 мая 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
La vivoverko de Zamenhof daŭre inspiras, 100 jarojn post lia morto.....	6
Eventoj	7
Przemysław Wierzbowski. Pri Zamenhof lia urbo memoras	8
Ela Karczewska. Gaja printempo en Bjalistoko	9
La Pollanda parlamento honoris Zamenhofon.....	11
Petro Zilvar, Zsófia Kóródy. Zamenhof elradias el la Esperanto-urbo.....	12
Richard Delamore. Freŝbakitoj atendas vin en Amikumu.....	13
Valentin Melnikov demisiis	15
Sofja Zareckaja. Esperantisto arestita en la Ruslanda ĉefurbo	15
Inaŭgura sesio de la nova Civita parlamento	16
La 42a programo de Radio Esperanto	18
Amri Wandel. Viva kongreso en kvar maroj	19
Renato Corsetti. La jubilea MEK: Floru 200 floroj!	21
Mezorianta Esperanto-Kunveno	22
Ralf Haumer. 33a PSI, bonetosa kaj ludplena	23
Paulo Sergio Viana. Riĉenhavaj konferencoj en Petropolo.....	24
Irina Gonĉarova. La sesa Lingva Festivalo en Kaluga	25
Jang Jeong-Ryeol (Ombro). Tricent ĉiumonataj kursoj en Seulo	26
TEJO kolektis pli ol 21 mil eŭrojn por venigi junajn afrikanojn al la unua IJK en Afriko!	27
Irina Gonĉarova. Moskvaj esperantistoj konatiĝas kun moderna fotoarto.....	28
Ilona Koutny. 20-jariĝo kaj la nova grupo de la Interlingvistikaj Studoj	29
Katalin Kováts, Renato Corsetti, Zsófia Kóródy. Aliĝu al someraj KER-ekzamenoj	30
Koncize (11 informoj)	31
Tribuno	32
Xavi Alcalde. Tradicio kaj moderneco: 3. Pri la nombro de esperantistoj	33
Johan Derks. Kio estas pli patriota, -io aŭ -ujo?	35
Ilja Gnusarev, Peter Baláž. Nova retejo de E@l pri Zamenhof	37
Ĉielismo Wang Tianyi. Ĉina stafeto al la 102a UK en Seulo.....	38
Claude Nourmont. Kvinpetalo: Esperanto-centro en vilaĝo	39
Franjo Forjan. Ekspozicio de infandesegnaĵoj.....	41
Arkivo	42
Jubileoj kaj memordatoj en majo 2017	43

Nikolai Lozgaĉev. Aŭtobiografiaj skizoj.....	44
Aleksander Korĵenkov. Postvortoj.....	47
Kulturo	48
Nikolai Lozgaĉev. Poemoj	49
Aleksander Korĵenkov. Nia libroproduktado en la 2016a jaro.....	55
Aperis la unua numero de <i>Heroldo de Esperanto</i> por 2017.....	60
Ricevitaj gazetoj	60
<i>Literatura Foiro</i> , 2016, №286	61
Mozaiko	62
Pri kiu temas?.....	63
Valentin Melnikov. Versportreto 8.....	63
Respondoj.....	63
Spritaj splitoj kaj preskeraroj	64
Kiel aboni <i>La Ondo</i>	65

Sur la kovropaĝo. La 15an de aprilo 2017 en la Ruslanda urbo Kaluga okazis la sesa lernejana lingva festivalo, organizita de Moskva Esperanta Asocio MASI kun la helpo de urbaj edukaj instancoj. Pli ol tricent lernemuloj ĉeestis en la prezentadoj de 17 lingvoj, tri prelegoj kaj kvar lingvopraktikoj. Ĝi estas la sola en la mondo lernejana lingva festivalo, kaj ne nur la plejparto de la publiko, sed ankaŭ multaj el la prezentantoj estas lernejanoj; ekzemple, Esperanton prezentis la 12-jara liceano Pjotr Fedosov, kiu – pro neĉeesto de Irina Gonĉarova – salutis la festivalon en la nomo de MEA MASI. (Foto: Ksenija Jefremkina)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Zamenhof Creator of the international language Esperanto

English ≡



The One Hundredth
Anniversary of the
Death of L.L. Zamenhof

Commemorated under the auspices of UNESCO

The One Hundredth Anniversary of the Death of Ludwik Zamenhof (14 April 2017)

The growing reach of Esperanto, the international language

Written by Louis von Wunsch-Rolshoven

Translated and adapted by Matthew Smith and Humphrey
Tonkin

„Mi lernis Esperanton, kiam mi estis infano. Mia patro parolis kun mi en Esperanto.“ (I learnt Esperanto when I was a child. My father spoke to me in Esperanto) said an adult student, who learnt Esperanto at home. She continues to use Esperanto with her father and with a few of her friends, whom she met as a child at Esperanto family gatherings. She speaks several other languages as well.

[Click here to see events about Zamenhof all over the world](#)

La vivoverko de Zamenhof daŭre inspiras, 100 jarojn post lia morto

La 14a de aprilo 2017 estas la 100a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. En tiu ĉi solena tago, Universala Esperanto-Asocio ree substrekas la gravecon kaj daŭran valoron de lia vivoverko, pri kiu eblas nun legi en trideko da lingvoj ĉe la nova retejo: <http://www.zamenhof.life/>

“Zamenhof ne nur havis genian intuicion pri lingvoj”, komentas d-ro Mark Fettes, la prezidanto de UEA. “Li ankaŭ sukcesis vortumi, interalie per siaj kongresaj paroladoj, kernan etikan vizion por la Esperanto-movado. Temas pri la konvinko, ke la kunvenado kaj kunparolado de ‘homoj kun homoj’ estas ne nur praktike utila sed ankaŭ spirite profunda paŝo al interkompreniĝo”.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis en 1859 en mezklasa juda familio en Bjalistoko, urbo tiam situanta en la okcidenta parto de la Ruslanda Imperio. Jam ekde sia adoleska aĝo li komencis eksperimenti pri la kreo de neŭtrala lingvo. Finfine en 1887 en Varsovio aperis la Unua Libro pri la Lingvo Internacia de d-ro Esperanto. Dum la sekvaj 25 jaroj Zamenhof, kune kun sia edzino Klara, dediĉis grandan parton de siaj tempo, energio kaj financaj rimedoj al la flegado de la frua movado. Li vaste korespondis, redaktis revuojn kaj librojn, aŭtoris artikolojn kaj poemojn, tradukis verkojn de la monda literaturo kaj ekde la unua Universala Kongreso en 1905 prezentis ankaŭ serion de inspiraj kongresaj paroladoj. Estas eksterdube, ke lia konstanta, senlaca kaj saĝa agado tra tiuj ofte malfacilaj jaroj estis nepara por la stabiligo de la lingvo kaj ĝia komunumo.

“Kune kun sia etika vizio, Zamenhof obstine tenis sin al la ideo, ke Esperanto apartenas al ĉiuj siaj parolantoj”, aldonas Fettes. “Malsame ol multaj aliaj planlingvaj aŭtoroj, li dekomence serĉis manieron fordoni sian gvidan rolon. Tial li reagis tre pozitive al la fondo de UEA en 1908, ĉar li prave vidis, ke la movado bezonas komunan tegmentan organizon en kiu ĉiuj esperantistoj povas kunlabori, sendepende de siaj naciecoj kaj siaj diversaj ideoj tendencoj. Liaj ideoj kaj lia ekzemplo restas inspiraj por ni ankoraŭ hodiaŭ”.

Okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, en 1959, Unesko rekonis lin kiel unu el la Grandaj Personecoj de la Homaro. Ankaŭ ĉi-foje, lia morto-datreveno estas listigita de Unesko inter la notindaj datrevenoj de la jaro 2017. Agante laŭ tiu instigo, la pollanda parlamento la 7an de aprilo aklame akceptis rezolucion pri la signifo de lia vivoverko. Solenaĵoj, simpozioj kaj aliaj datrevenaj eventoj okazados tra la mondo ĝis la jarfino; kalendaro troveblas ĉe <http://www.gazetaro.org/eventoj/>

GK UEA

Eventoj

Kvankam la ĵusa aprilo restas en nia memoro pro tio, ke dum ĝi oni okazigis plurajn aranĝojn esperantistajn kaj publikajn lige kun la centa datreveno de la forpaso de Lazarj Markoviĉ Zamenhof, en aprilo okazis evento, kiu eble havos gravan efikon al Esperantujo, nome: la 22an de aprilo estis lanĉita la apo (poŝtelefona aplikaĵo) Amikumu, kiu helpas trovi proksimajn esperantistojn. Dum la tri unuj tagoj abonis al Amikumu 2758 esperantistoj.

Richard Delamore, la ĉefa prizorganto de Amikumu, rakontas al ni pri la ekfunkcio de ĉi tiu tre utila serĉilo kaj komunikilo.





Koncerto “Esperanto – la lingvo de espero” (Foto: Nina Pietuchowska)

Pri Zamenhof lia urbo memoras

La 12-an de aprilo bjalistokaj esperantistoj, reprezentantoj de pluraj lernejoj, urbaj aŭtoritatoj kaj estroj de kultur-institucioj renkontiĝis ĉe la Zamenhof-monumento por omaĝi doktoron Zamenhof, forpasintan antaŭ 100 jaroj. Krom flormetado kaj tradicia komuna foto, la kunvenon gajigis infanoj el loka infanĝardeno, kantantaj en Esperanto, kaj la infana muzikbando *Uku-Donaco Bjalistoko*, kiu prezentis por la unua fojo *La Esperon* laŭ nova muzika komponaĵo de Lech Mazurek.

La renkontiĝo estis bona okazo por danki al la urbaj reprezentantoj subtenadon de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto. Ni memorigis, ke en la nova Centro Ludoviko Zamenhof / Bjalistoka Kulturcentro la 12-14an de majo okazos la 36a Pola Esperanto-Kongreso, ke danke al urba financado ni eldonas plurajn librojn (ĉi-jare – la verkaron de la bjalistoka poeto Wiesław Kazanecki), ke loka turismo-asocio organizas interesajn teatrecajn promenadojn tra Bjalistoko laŭ spuroj de Zamenhof, kaj fine ke dum la nokto de muzeoj okazos urba ludo dediĉita al Doktoro Esperanto.

La sekva programero dum tiu tago estis malfermo de ekspozicio de Esperantaj filatelaĵoj en Centro Ludoviko Zamenhof. Ĉeokaze reprezentantoj de Pollanda Poŝto prezentis novan karton omaĝan al Zamenhof, kaj la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio Aleksander Zdechlik menciis, ke la eldonaĵo estas la rezulto de streboj de koleginio Ela Karczewska el la Esperanto-libraro. La poŝtkarto estis samtempe prezentita en la urbo Słupsk, en kiu polaj esperantistoj paralele organizis interesan Esperanto-festadon.

La 13an de aprilo la Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio prezentis koncerton: “Esperanto – la lingvo de espero” kun la dirigento Paweł Kotla. Krom *Fanfaro por Eŭropo* de Panufnik kaj *Fantazio c-moll op. 80* de Betoveno, oni prezentis la unikan esperantlingvan simfonion *Esperanto* de David Gaines kun bonega mezosoprana voĉo de Joanna Dobrakowska, kiu sukcese redonis la malfacilan tekston de la simfonio. Antaŭ la koncerto oni povis aŭskulti mian kurtetan prezenton pri Zamenhof.

Necesas menci, ke dum la lasta kunsido nia urba konsilio alprenis du gravajn decidojn: unue, omaĝi Zamenhofon okaze de lia 100a mortodato; due, doni al nova strato la nomon Jakobo Ŝapiro, antaŭmilita gvidanto de la bjalistoka Esperantomovado, kaj tiel havigi jam la kvaran (post Zamenhof, Grabowski kaj Esperantistoj) straton omaĝan al nia movado. Aŭtune, okaze de la 120a naskiĝdato de Ŝapiro, ni eldonos lian antikvan gvidlibron tra Bjalistoko en nova prilaboro.

Ni kredas, ke la Esperanta afero estas bone subtenata de la naskiĝurbo de Zamenhof, kaj venontaj planataj agadoj tion klare pruvos.

Przemysław Wierzbowski

Gaja printempa prezentado en Bjalistoko

Kara leganto, ĉu via organizo havas multe da ofertoj por infanoj kaj junularo? Ni ofte ripetadas, ke la estonteco de Esperanto dependas de niaj heredantoj, sed fakte ni ne sufiĉe zorgas pri ili.

La 17an de aprilo, tagmeze, sur la bazara placo en Bjalistoko estis aŭdeblaj surdaj sonoj de tamburo. Post la momento almetiĝis akordiono.

“Panjo, ĉu ni kontrolu kio okazas?” – demandis knabineto promenanta kun la gepatroj.

Apud la kafejo *Esperanto* staris du muzikistoj kaj ludis la melodion de *La Espero*.

En la reta afiŝo ni anoncis: “Eble ĝuste ĉi tie juna Ludoviko aŭskultis printempe la sonojn de cimbalo aŭ violono kaj observis muzikistojn petantajn monon”.

Dum kelkaj minutoj ni estis ĉirkaŭitaj de junaj kaj plenkreskaj aŭskultantoj. Venis novaj infanoj kaj junuloj kun muzikinstrumentoj kaj komenciĝis komuna koncerto. Eksonis la kanto

*Saltu, saltu, infanar’,
dum junas vi, kun ŝat’
de l’ printempo ĝis la vintro
salto de la kat’.*

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Valentin Melnikov demisiis

La 24an de aprilo en kunveno de la Moskva Esperanto-Klubo “Lev Tolstoj”, en kiu okazis diskuto kaj disputo pri la “afero Ŝiro” (vidu ĉi-sube), la konata Esperanto-literaturisto Valentin Melnikov demisiis el la Estraro de la landa asocio REU. En sia demisia mesaĝo la Moskva poeto kaj tradukanto Melnikov skribis:

<...> Estis mia granda eraro balotiĝi tien en 2015: tiam mi esperis, ke REU estas ankoraŭ revivigebla, sed nun mi vidas, ke ĝi plu restas privata havaĵo de “dumvivaj estraranoj” por diversaj strangaj maĥinacioj. La tuta Esperanto-agado en Rusio okazas ekster REU kaj malgraŭ ĝi – kvankam REU ŝatas atribui al si la meritojn, kaj la prezidantino de REU ĉiam plendas, ke oni ne volas membriĝi. Sed neniuj povus respondi: kion donas REU-membreco al ordinara Esperantisto. Plejparto de la membraro estas la dumvivaj membroj (multaj el kiuj elmigris el Rusio, iuj ĉesis okupiĝi pri Esperanto ktp.) kaj asociitaj membroj kiuj fojfoje vizitas lokan klubon kaj apenaŭ konscias sian membrecon. La “vivaj” rekte kotizantaj membroj de REU estas *nur 19* inkluzive de unu brazilano!

Mi jam en 2006 proponis likvidi REU – tiam oni ne volis min aŭdi kaj, kiel kutime, priĵetis min per koto; sed post kelkaj jaroj en vica konferenco nur unu voĉo mankis por trakti ĉi tiun proponon. Tiakaze eble post 10-15 jaroj renaskiĝus normala Landa Asocio, certe kun tute novaj homoj.

<...> Mi plu okupiĝos pri Esperanto-literaturo, volonte renkontiĝos kun ĉiuj honestaj Esperantistoj, mi pretas fari ekskursojn por gastoj de Moskvo k. a. Ne hezitu kontakti min persone...



Valentin Melnikov

Esperantisto arestita en la Ruslanda ĉefurbo

La 6an de aprilo la moskva esperantisto Dmitrij Bogatov estis arestita pro suspekto pri alvokoj al terorismo kaj al amasaj malordoj, ĉar de lia IP-adreso interrete estis dissenditaj tiaj mesaĝoj. La arestito ne konfesas sian kulpon kaj asertas, ke li estis unu el operatoroj de elirnodoj de la anonimiga retsistemo “Tor”.

Dmitrij Bogatov kaj lia edzino Tatjana lernis Esperanton en oktobro 2013 en la baza Esperanto-kurso FaRo. Ekde tiam ili estas membroj de la Moskva Esperanto-Asocio MASI, ili aktive partoprenas Esperantajn aranĝojn kaj prelegas en Esperanto. Dmitrij Bogatov, kies Esperanta kromnomo estas Ŝiro, restos arestita ĝis la 8a de junio, dum oni esploras la aferon.

Sofja Zareckaja



Claude Dubois, la urbestro de Loklo, tostas je la sano de Esperantio (Foto: Civita Arkivo)

Inaŭgura sesio de la nova Civita parlamento

La 13an de aprilo 2017 en Loklo (Le Locle, Svislando) okazis la inaŭgura sesio de la Parlamento de la Esperanta Civito, en ĉeesto de la urbestro, kiu akceptis la ĵuron de la senatanoj pri lojaleco al la Konstitucio. La sesio situis ene de la Paskaj tagoj, kiuj proponis vastan programon, kulturen kaj organizan.

Krom la du branĉoj de la Civita Parlamento kunvenis la Kapitulo, la Asembleoj de Kultura Centro Esperantista kaj de Kooperativo de Literatura Foiro. La partoprenantoj (el Bulgario, Francio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kroatio, Svislando) celebris la Tagon de Ĉiuj Pioniroj, koincide kun la centa datreveno de la forpaso de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Malgranda kolokvo pritraktis la semantikon en esperanto.

En sia alparolo al la Forumo (la pariteta asembleo de la paktintaj establoj) la eliranta Konsulo, Marie-France Conde Rey, retrospektivis pri la tria parlamenta mandato. Ŝi emfazis la atingojn de la konsorcio, specife la servojn adjudikitajn al kelkaj paktintoj, la agadon de fondumo Pro Esperanto (la Civita «banko») en la konstrua sektoro, la starigon de tri legacioj (Budapeŝto, Stokholmo, Bruselo), la okupon de gravaj merkatiĉoj.

“Indas menciigi la apartan atenton kiun la Civito, en siaj diversaj komponantoj, dediĉis al du sektoroj kiujn la malnova Esperantio neglektas aŭ ofendas: la virinoj kaj Afriko. Ni aldonis trian sektoron, subtenante la longan batalon de la junularo por sia emancipiĝo. La Civito daŭre apogos ankaŭ la batalon por la emancipiĝo



Chamberline Nguefack, estas la nova Konsulo de la Civito.

de la afrika Esperantio, surbaze de la Deklaracio pri la afrika esperantismo, aprobita de la 6a Afrika Kongreso de Esperanto en Togolando, fine de 2015”, – konkludis la emerita Konsulo.

Al ŝi eĥis la nova Konsulo, Chamberline Nguefack, en sia alparolo al la Senato (la asembleo proporcie elektita de la individua civitanaro): “La Esperanta Civito montras sin pli avangarda ol la ordinara mondo, havinte la kuraĝon elekti afrikaninon al la prezida posteno. Se licas la etan kompari al la ega, mi dirus ke nia Civitanaro estas demokratie pli evoluinta ol la Usonanoj, kiuj jes elektis sian unuan prezidenton kun nigra haŭto, sed ankoraŭ ne kuraĝis elekti virinon. Vi havas virinon kun nigra haŭto kiel Konsulinon. Esperantio (danke al la Civito) ne restis en la dudeka jarcento, sed anticipas la tempojn en la dudek-unua”.

La Forumo aprobis la rezolucion proponitan de FAR, KCE, LF-koop, kiun prezentis la delegito de Fajsi Amika Rondo, Tihomir Lovrić: dum la mandato 2017-2021 la novaj aliĝantoj al la Pakto devas havi propran juran personecon. Per tio la organiza kulturo de la Civito ekskludas multajn iniciatojn el la virtuala mondo, kiuj ofte (kvankam ne ĉiam) estas bluoj.

Siavice, la Senato okupiĝis pri pacifismo kaj pri konstitucia amendo. Senatano Riichi Karibe (Verda grupo) prezentis leĝoproponon, kiun la gekolegoj aprobis unuanime. Per tio la Civito distanciĝas de la svisaj normoj, kaj militrifuzo neniel estos konsiderebla kiel delikto. La koncepto pri pacifismo ricevis precizigon dum la debato, kiam sen. Franco Levi (Verda grupo) demandis pri la Civita sinteno rilate al kriza situacio, kiel tiu nuntempa kun Norda Koreio. La Vickonsulo, sen. Giorgio Silfer, memorigis pri la rezolucio okaze de la lasta iraka milito, kaj rimarkigis ke en tiaj kazoj la Civito aprobus nur armeajn intervenojn de Unuiĝintaj Nacioj.

“La Esperanta Civito, adoptante la principon de la Naŭa Artikolo de la Japana Konstitucio, inklinas al la malekzisto de naciaj armeoj, sed favoras la ekziston de supernacia pacforto kiu dependas de UN, kaj ne de superpotenca koalicio”, – konkludis la Vickonsulo.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Okaze de la Tago de la Libro, la Kongreso de Deputitoj de Hispanio (la baza leĝdona ĉambro de la parlamento) organizis 20 apr prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de *Don Quijote*, donacitaj al ties Biblioteko, inter kiuj estis ankaŭ la versio en Eo, donacita de Hispana E-Federacio. (Landa Agado)

Okaze de la Holokaŭsta tago en la Israela memorejo Jad Vashem oni metis florkronojn nome de la prezidento, ĉefministro, ŝtataj instancoj k diversaj organizaĵoj; inter kiuj, same kiel ĉiujare ankaŭ florkrono nome de ELI k UEA. (Landa Agado)

800 instruistoj de la urbo Sorriso (ŝtato Mato Grosso) estos liberigitaj de sia laboro por partopreni en la 52a Brazila E-Kongreso, okazonta 15-18 jun 2017; per interkonsento inter la organizantoj de la kongreso k de la loka oficejo por edukado k kulturo la instruistoj rajtos partopreni sen kotizo en la kongresaj prelegoj k kursoj. (BEL)

25 apr antaŭ 70 aŭskultantoj en la historia fakultato de la Universitato de la Tria Aĝo en Kaŭno (Litovio) la prezidanto de Litova E-Asocio Povilas Jegorovas dum unu horo prelegis pri la temo "Ludoviko Zamenhof kaj Kaunas: La viva memoro de Kaunas" k respondis plurajn demandojn. (Esperanto-It)

21 apr en la Fakultato pri Edukado de la Universitato de Seviljo okazis la kurso "Esperanto kaj sociaj sciencoj" kun prelegoj k atelieroj gviditaj de la prezidanto de Hispana E-Federacio José Antonio del Barrio k la sevilaj profesoroj Juan Diego Díaz, Antonio Rodríguez k Vicente Manzano. (La Bitbulteno)

En la filologia biblioteko de la Universitato de Barcelono 14 apr ekfunkciis ekspozicio «La lingvo sen mastroj: Esperanto cent jarojn post Zamenhof»; ĝi estos vizitebla ĝis mezo de majo. (La Bitbulteno)

Osmo Buller, la antaŭa multjara ĝenerala direktoro de UEA, ĵus estis elektita kiel membro de la municipa konsilio de Taivalkoski (nordorienta Finnlando) laŭ la listo de la maldekstra partio Vasemmistoliitto. (Libera Folio)

La brazila advokato Hélder Vieira Lopes estas la nova prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE) en Rio-de-Janeiro; li anstataŭas la radioparoliston Givanildo Costa, kiu prezidis KKE ekde 2001. (Esperanto Ilustrita)

21 apr tri E-poetoj (Ana Manero, Jorge Camacho k Miguel Fernández) k du famaj hispanlingvaj kolegoj (María Ángeles Maeso k Alberto García-Teresa) prezentis hispane k Ee poezian vesperon en la madrida kulturcentro EKO, kadre de la liberecanaj kulturaj renkontiĝoj JACA3. (La Bitbulteno)

9 apr en la Zaozhuang-a universitato (Ĉinio) okazis la inaŭgura ceremonio de la Shandong-a E-Klubo, fondita en decembro 2016; nun ĝi havas 54 membrojn. (El Popola Ĉinio)

TEJO pro nepartopreno en tri sinsekvaj voĉdonadoj eksigis el sia komitato la reprezentantojn de kvin landaj sekcioj: ili estas komitatanoj A por Benino, Ĉinio, Hungario, Irano k Meksiko. (Libera Folio)

Tribuno

Kiom da esperantistoj estas en la mondo? La respondoj varias de kelkaj dekmiloj ĝis kelkaj milionoj. Jam Zamemhof dum 20 jaroj aperigis adresarojn de esperantistoj, celante havi 10 milionojn da adresoj, sed la lasta el ili havis la numeron 21.915. En 1928 aperis statistiko, kiun antaŭ du jaroj lanĉis Johannes Dietterle, direktoro de la Germana Esperanto-Instituto. Laŭ ĉi tiu statistiko en pli ol 100 landoj, en pli ol 7000 lokoj de la mondo, estis entute 126 mil 576 esperantistoj, pri kiuj ni havas fidindan scion. El ili 41 mil 751 estas organizitaj en 1776 grupoj.

La plej lastan provon kalkuli la esperantistojn ĉi-monate analizas Xavi Alcalde en la tria parto de sia serio “Tradicio kaj moderneco”.



Tradicio kaj moderneco

3. Pri la nombro de esperantistoj

Jen demando ĉiam aktuala: kiom da esperantistoj estas en la mondo? Tradicie proponiĝis malsamaj taksoj, ne ĉiuj science. Tial, salutindas la nova kalkulo de Svend Vendelbo Nielsen. Laŭ la kalkulo de la juna doktoriĝa studento, la suma kvanto da homoj, kiuj en censo indikus, ke ili parolas Esperanton, estas ĉirkaŭ 63 mil en la tuta mondo. Por konstrui sian modelon, Svend Vendelbo Nielsen en Danio uzis informojn pri membronombroj de diversaj esperantaj organizaĵoj kaj retejoj, kune kun censaj statistikaĵoj. Vidu: <http://www.liberafolio.org/2017/02/13/nova-takso-60-000-parolas-esperanton/>.

63 mil homoj scipovas la internacian helplingvon. Tiu nombro, sufiĉe pli malalta ol antaŭaj proponoj, tuj estis kritikita de kelkaj el niaj propagandistoj. Ĉu ili pravas? Miaopinie jes, sed nur parte.

Ŝajnas, ke la aŭtoro de la nova takso eklernis la lingvon pere de Duolingo en majo 2016. Pro tio plej verŝajne lia kono de la movado ne estas tre ampleksa. Ĉi tie mi argumentos, ke sen familiariĝo kun esencaj (historiaj, piskologiaj kaj sociologiaj) aspektoj de la Esperanto-movado, tre malfacilas fari tian taksadon. Tri ekzemploj helpas al ni klarigi tiun ideon.

Unue, sen koni la debaton pri kio signifas esti Esperantisto oni ne povas operaciigi la dependan variablon. En la ekstera mondo oni pensas, ke ĉiu scipovanto de la lingvo aktivas movade, kaj inverse. Ene de la movado oni scias, ke la afero estas iom pli komplikita. Kiu estas la aliro de la aŭtoro? Unuflanke, li konsideras, ke esperantistoj estas la homoj, kiuj en censo indikus, ke ili scipovas Esperanton. Aliflanke, li ne konsideris la hungaran kazon, ĉar liaopinie multaj en Hungario studis Esperanton en la lernejo, sed poste neniam aktive uzis ĝin nek aliĝis al ajna organizaĵo. Alivorte, li ne vere komprenas esperantiston kiel lingvo-scipovanton (kio signifas scipovi lingvon?), sed kiel aktivan movadanon. Jen du difinoj tute malsamaj, eĉ kontraŭaj, ĉar estas movadanoj, kiuj ne scipovas la lingvon, kaj inverse. Eble oni ne bezonas koni ĉiun nuancon de la raŭmisma/finvenkisma dialogo, sed nepras iom da tiusenca ripenso por eviti evidentajn kontraŭdirojn, kiuj malfortigas la esploron.

Due, la aŭtoro faris sian kalkulon, kvazaŭ ne ekzistus antaŭjuĝoj pri nia afero. Tial, kiam oni demandas al ni kiujn lingvojn ni scipovas, esperantistoj nature respondas (minimуме) Esperanton. La realo, denove, estas iom pli komplikita. Fakte, jam plurfoje psikologia antaŭjuĝo estis identigita kiel la ĉefa malfacilaĵo por la antaŭeniro de la movado. Interalie, la verkoj de Claude Piron klare sugestas tion. Antaŭ ne longe, Evildea en youtube konsilis al la esperantistoj menci la scipovon de Esperanto en viv-protokoloj, kandidatiloj kaj labor-intervjuoj. Se oni sentas la

bezono doni tian konsilon, tio signifas ke homoj kaŝas ilian esperantistecon en la ekstera mondo. Sekve, rezultoj eliritaj el tia metod-esploro verŝajnas pli sugestoj ol veraj konkludoj.

Trie, la debato inter kvantaj kaj kvalitaj analizoj havas longan historion en sociaj sciencoj. La kvantaj fakuloj asertas, ke por obteni rezultojn, kiuj validos ĝenerale, oni devas studi multajn kazojn. La kvalitaj fakuloj respondas, ke ĝisfunda kono de ĉiu kazo nepras por atingi signifan konkludon. Laŭ nunaj sociaj sciencistoj, ambaŭ vidpunktoj parte pravas, kaj pro tio altkvalitaj esploroj klopodas miksi ambaŭ metodojn. Tiusence, esperantologiaj esploroj ne estas escepto, kaj la statistika analizo de Nielsen suferas pro manko de scio pri la karaktero de lokaj kaj naciaj movadoj. Ekzemple, li defendas, ke Andoro estas unu el la landoj kun pli da denseco de esperantistoj. Kiel kelkaj jam avertis, parto da katalunoj ofte elektas Andoron kiel sian hejmlandon, tiel evitante sian konsideriĝon kiel hispanoj aŭ francoj. Tiumaniere, la Nielsena takso verŝajne troigas la datumojn pri Andoro kaj maltroigas tiujn pri Hispanio. Kvankam la katalunisma sinteno de la tiea movado (fakte, pli densa ol aliaj) estas konata aspekto, facile rekonebla eĉ pere de surfaca kvalita esploro, Nielsen preferas ree ignori ĝin kaj tio dubigas la rigoron de lia certe interesa esploro.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj ene de nia movado bonvenigis la novan kalkulon fare de bioinformadikisto kaj freŝbakita esperantisto. Kompreneble, temas pri pli da konkurenco. Aldone, ĝi montras, ke parto de la tradiciaj studoj baziĝas sur ne sciencaj kriterioj. Siaflanke, ankaŭ la aŭtoro ne bonvenigis bonintencajn kritikojn, malgraŭ tio, ke la scio akirita dum la pasintaj jardekoj (pli kvalita ol kvanta) ja utilas.

Konklude, sur la bazo de tiu jam ekzistanta kono, oni devas subteni interfakajn kaj miksmetodajn klopodojn por modernigi la esperantologian esploradon. Por sukcesa kunlaboro inter novaj esploristoj kaj fakuloj pri esperanta historio kaj sociologio, ambaŭ partoj devas alfronti la debaton el malferma menso kaj konstrua perspektivo. Fakte, ili bezonas unu la alian. Sen la unua, la dua riskas resti amatora esplorado primokata de la ekstera mondo. Sen la dua, la unua riskas resti metoda virtismo tute for de la realo.

Xavi Alcalde

En la serio *Tradicio kaj moderneco* de Xavi Alcalde pli frue aperis:

1. *Pri TEJO kaj la Civito II La Ondo de Esperanto*, 2017, №2, p. 38-39.
2. *Pri Louis de Beaufront II La Ondo de Esperanto*, 2017, №3, p. 38-39.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kvinpetalo: Esperanto-centro en vilaĝo

En centrokcidenta Francio, en agrabla vilaĝo Bouresse, 40 km sud-oriente de Poitiers, funkcias la Esperanta kulturcentro Kvinpetalo. Kvinpetalo estas la staĝejo, kulturcentro kaj studocentro de Societo Yvonne Martinot (SYM). Ĝi estis fondita en 1985.

Dum preskaŭ dudek jaroj la centron estris kaj mastrumis Georges Lagrange kaj Suzanne Bourot. Post la forpaso de Georgo kaj retiriĝo de Suzanne, la centro plu funkcias per sinsekvo de bonvolulaj teamoj, kiuj plenumas la laboron, kun la nepre necesaj helpoj de la staĝanoj mem.

Kvinpetalo organizas staĝojn por instrui la lingvon Esperanto kaj pri diversaj aspektoj de Esperanta kulturo (historio de la movado, literaturo, ktp.) kaj ankaŭ staĝojn pri diversaj fakoj (ornitologio, joko, trikado, muziko, astronomio, piedmigrado, botaniko, ktp.) per Esperanto. Dum tiuj staĝoj oni serioze laboras kaj multe lernas, sed ankaŭ ridas! Oni konstante praktikas la lingvon en ĉiutagaj situacioj, sed eblas ankaŭ ripozi en kvieta kampara ĉirkaŭo kaj ĝui la amikan etoson kaj vivstilon de la domo. Ni klopodas, ke ĝi estu malkrokodilejo!

Kompreneble, eblas prepari kaj trapasi la oficialajn ekzamenojn de Franca Esperanta Instituto en ekzamensesioj organizataj fine de la staĝoj.

Kvinpetalo enhavas, krom sia propra ampleksa biblioteko, la librarojn postlasitajn de pluraj elstaraj francaj esperantistoj – Gaston Waringhien, Roger Bernard, Maurice Sujet. La libroj kaj diversaj dokumentoj estas konsulteblaj surloke. La bibliotekon prizorgas Philippe Cousson, kiu nun katalogigas la tutan enhavon.

En la lastaj jaroj okazis regule pluraj staĝoj sub gvido de elstaraj fakuloj.

Ekzemple ĉiujare okazas staĝo pri altnivela tradukado sub gvido de vicprezidanto de la Akademio Brian Moon, profesia tradukisto. Ankaŭ ĉiujare okazas staĝo “Promeni tra naturo kaj Vikipedio” kun Alain Favre, konata fungologo kaj botanikisto en Francio (ne nur en Esperantio!). Bernard Lagrange, kiu regule prizorgas la ĝardenon de Kvinpetalo, organizis praktikajn staĝojn pri ekologia ĝardenumado. Tiuj staĝoj plej glate kaj efike okazas kun malgranda nombro de partoprenantoj.

kvinpetalo




Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 60 jaroj naskiĝis Nikolai Lozgaĉev (1957-98), la unua kaj sola prezidanto de Esperanto Rondo Kulturo (1984-92) kaj de Ruslanda Esperanto-Asocio (1992-94), redakciano de la almanako “Sezonoj”, aŭtoro kaj tradukinto de poemoj kaj kantoj, komponisto kaj plenumanto de originalaj kaj tradukitaj kantoj en Esperanto.

Jubileoj kaj memordatoj en majo 2017

5. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis Adam Goralski (1912-2005), pola kemiisto kaj entreprenisto loĝinta en Venezuelo, Kanarioj kaj Pollando. Li finance helpis plurajn Esperanto-projektojn kaj en 1982 starigis Fondaĵon Grabowski, kiu ĝis nun subtenas la Esperanto-kulturon per premioj kaj subvencioj.

5. Antaŭ 20 jaroj mortis Jaroslav Mařík (1913-97), ĉeĥa juristo, teknikisto kaj ĵurnalisto. Post la Dua Mondmilito li estis profesia esperantisto, laboranta en la Esperanto-redakcio de Radio Prago (1945-50) kaj kiel sekretario de EAĈSR ĝis ties malfondo en 1952. Kunfondinto de ĈEA (1969) kaj ties estrarano ĝis 1977, (kun)aŭtoro kaj (kun)tradukinto de pluraj verkoj, vaste konata en la movado kiel “Marŝanta Enciklopedio”.

14. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Lou Harrison (1917-2003), usona komponisto kaj esperantisto, doninta Esperantajn titolojn kaj tekstojn al pluraj siaj verkoj, interalie al sia ĉefverko *La Koro Sutro* (1973). Esperanton li uzis ankaŭ en siaj poemoj.

16. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis Nikolaj Viktoroviĉ Lozgaĉjov (Лозгачев, 1957-98), inĝeniero kaj grafikisto, konata en Esperanto kiel Nikolai Lozgaĉev, la unua kaj sola prezidanto de Esperanto Rondo Kulturo (1984-92) kaj de Ruslanda Esperanto-Asocio (1992-94), redakciano kaj fine redaktoro de la almanako *Sezonoj*, kunkompilinto de *Rusa Antologio* (2003), aŭtoro kaj tradukinto de pluraj poemoj kaj kantoj, kiuj aperis en lia poemaro *La Tago del Eterno* (1987), en *La birdo Gamajun* de Vysockij (1989) kaj en *Kvarteto* (1996), komponisto kaj plenumanto de originalaj kaj tradukitaj kantoj en Esperanto.

24. Antaŭ 60 jaroj mortis Francisko Valdomiro Lorenz (František Vladimír Lorenc, 1872-1957). Ĉeĥo, migrinta en 1893 al Brazilo; instruisto, lernejestro, lingvisto, popolkuracisto, spiritisto, framasono, aŭtoro de pluraj lingvistikaj verkoj. Pioniro de Esperanto (1889) en Bohemio kaj Brazilo, aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro por ĉeĥoj, la plej konata Esperanto-spiritisto, tradukinto de pluraj verkoj, i. a. de *Bhagavad-Gîtâ* (1942) kaj *Diverskolora bukedeto* (1941) tradukita de li el 40 lingvoj kaj *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo* (1944), antologio de poemoj mediume verkitaj, i.a. de Zamenhof kaj Grabowski.

31. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Lajos Kökény (1897-1985), konata en Eo kiel Ludoviko Kökény, hungara instruisto, stenografo kaj esperantisto. De 1932 afergvidanto kaj vicprezidanto de HES, prezidanto de HES (1941-47). En 1947 post la unuigo de HES kaj HESL iĝis kunprezidanto de la komuna asocio, fermita en 1950. Verkis kaj tradukis kelkajn Esperanto-librojn. Redaktoro de *Hungara Heroldo* (1928-30, 1935-36), *Hungara Vivo* (1961-68) kaj *Hungara Esperantisto* (1971-73). Lia ĉefa merito en Eo estis redaktado de la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto*.



Aŭtobiografiaj skizoj

Mi naskiĝis la 16an de majo 1957 en “klasika” laborista-kampana familio. La plej malproksima praulo, kiun mi konas, estas la praavo laŭ la patro. Li estis konstruisto de riverpontoj kaj li trairis la tutan Ruslandon de Niĵnij Novgorod, apud kiu naskiĝis mia avino, ĝis Ĥabarovsk, kie li mortis. Lian junan filinon post la intercivitana milito alveturigis al Permo soldato de la unua mondmilito, kiu iĝis mia avo. Li devenis el la urbeto Uŝolje en la supra fluo de la rivero Kama, sed li ekloĝis en la gubernia centro, okupiĝante pri kapvestoj individue, poste – kooperative, kaj transdoninte la profesion al mia patro. Nian duetaĝan brikan domon, en kiu antaŭ la revolucio estis juvel-magazeno, kaj poste restoracio, li kun aliaj enloĝontoj rekonstruis por privataj apartamentoj. Li havis ankaŭ alian familion, sed li ne restis tie longe. En la 1930aj jaroj li estis kelkatempe en prizono, pri kio en la familio oni neniam parolis. Li mortis kvar jarojn antaŭ mia naskiĝo sub radoj de trajno ĉe strangaj cirkonstancoj. Mi ne povis lin koni, sed laŭ la multaj fotoj mi formis imagon pri li kiel tuteca, digna rusa homo de meza klaso.

La avo laŭ la patrino estis mezhava kampano. Laŭ ŝiaj rememoroj li estis estimata de la vilaĝanoj, bonanima, kaj li ludis harmonikon. Li posedis forĝejon kaj

abelujon. Kiam komenciĝis la kolektivigado, li estis elektita la unua kolĥozestro, sed baldaŭ li estis elproprietigita en la nova kampanjo. Li mortis pro sunbato en kampo dum plugado. La multnombraj gefiloj po iom transloĝiĝis al la regiona centro.

Mia patrino lernis la unuan jaron en pedagogia lernejo, kiam ŝi ekmalsanis je gripo, post kio ŝi perdis la aŭdkapablon. Ŝi ekloĝis ĉe la frato en Permo kaj ricevis kudristan profesion. Mia patro de la naskiĝo malbone aŭdas kaj nekorekte parolas. Li restis absolute analfabeta, lerninte nur iom kalkuli. Tiel mi devis lerni krom la normalan rusan, ankaŭ la misan lingvon de l' patro kaj la lingvon de gestoj.

Pri mia edukado plejparte okupiĝis la avino, la patrino de la patro. Mi ĉiam rememoras ŝin kun dankosento. Kvankam ŝi lernis skribi kaj legi jam en matura aĝo, dum la senanalfabetiga kampanjo, ŝi posedis korektan urban lingvaĵon kaj ian denaturan inteligentecon. Ŝi mem ne sen kontento notis, ke la najbaroj nomas ŝin kun la patronomo, malkiel la ceterajn. Iam ŝi estis tradicie ortodoksa kristanino, sed poste, evidente sub la influo de la plej aĝa filo komunisto (kiu cetere estis kristane neprofitema) ŝi ŝanĝis Kriston je Lenin, nomante lin "la tera dio". Sed la alia avino ĝis la fino restis profunde religia, dank' al kio mi estas baptita kaj ricevinta la nomon de Sankta Nikolao. Kun honto kaj rideto mi rememoras miajn naivajn provojn pruvi al ŝi malsciencecon de ŝia kredo.

Mia infanaĝo finiĝis kun la morto de la patra patrino en 1972, kiam mi eniris en la aviad-teknikumon, kie mi ricevis la specialecon pri aviad-aparatoj. Tiuj kvar jaroj donis al mi multon: la verajn amikojn, kiujn mi kontaktas ĝin nun, la unuan adoleskan amon, interesajn vojaĝojn al Moskvo, Krimeo, Estonio, marŝojn tra la urala naturo, laboron en kolĥozoj, amatorajn okupojn pri teatro, muziko. Tiam mi ekŝatis Vysockij kaj komencis kanti liajn kantojn al amikoj. Kaj per Vysockij mi venis pli poste al poezio.

Poste mi iris por du jaroj al armeo, servante en la pilotlernejo de la ukraina urbo Ĉernigov. La servo estis tolerebla, ja aviacion oni nomas "la inteligencio de la armeo". Tamen mi tre sopiris pri la libereco kaj ne povis adaptiĝi al la arma ordo. Post la arma servo mi eklaboris en la perma avimotora uzino kaj samtempe ekstudis por ses jaroj en la vespera politekniko, tute inercie, ne supozante miajn verajn inklinojn.

Tiam, somere 1978, mi konatiĝis kun la ludo goo, kiu tre allogis min. Eble pro tio, ke mi neniam ludis ŝakon, kaj goo donis al mi memcertecon kaj egalajn ŝancojn, eble pro ekzotikeco. Sed mi ankaŭ sentis ian misian devon porti al la homoj ion nekonatan, sed konindan, pliriĉigi ilin. La saman senton poste elvokis en mi Esperanto, kaj eĉ nun – profesie – min allogis malvaste uzata en nia lando programlingvo MUMPS.

Mi opinias, ke tiu ludo multon donis al mi. Estas malfacile diri, ĉu ĝi influis min, ĉu mia karaktero kongruis kun ĝia spirito; eble tio efikis kune. Ja japanoj nomas ĝin "arto de harmonio" kaj diras, ke ĝi instruas la homon vivi. Ĝi ne toleras ŝakajn aventuristojn kaj postulas animan ekvilibron. Simpleco de ĝiaj reguloj similas al simpleco de Esperanto, sed kombinaĵoj, aperantaj sur la tabulo, mirigas per la varieco. Ĝia

spirito tute disas de la mezepoka taktiko de la ŝakoj kun ilia figursimbola konkretecio kaj igas pensi globale, celante dividon de influoj kaj areoj. Supozeble ĝi estas la plej antikva ludo, genie simpla kaj varia, kiel la universo mem.

Tiam mi skribis al la revuo *Scienca kaj Vivo*, aperiginta kurson de goo, kaj al mi respondis Aleksandr Gončarov, kiu laŭ la volo de l' ĉielo estis esperantisto. Li invitis min al esperantista tendaro en Ŝĉerbinka 1981 ludi goon, kie mi trafis en tute strangan, nekonatan kaj allogan medion, parolantan en nekomprenebla lingvo. Min interesis pure praktika flanko – la ebleco de lingva praktikado kaj ankaŭ la lingvistika fenomeno. Kvankam ankaŭ la etoso de la kunveno allogis min. Tie al mi estis donacita lernolibro kaj krome, laŭ la stranga koincido, tiama prezidanto de la perma Esperanto-klubo Aleksandr Ŝarov eklaboris en mia laborejo. Preskaŭ samtempe mi komencis verki versaĵojn en la rusa, lerni Esperanton kaj okupiĝi pri tradukado, kompreneble – pri mia ŝatata Vysockij. Esperanto konatigis min kun mia edzino, al kiu mi jam post duona jaro kantis el Vysockij en Esperanto, verkis poemojn en la rusa kaj ... en Esperanto, kiu poiom iĝis mia ĉefa kreolingvo, kiu rekreis en mia konscio, kaj kiu kreis kaj evoluigis el mi poeton.

En 1984 mi finis la politeknikon kaj forlasis pro Esperanto la uzinon. En la sama jaro okazis evento, kiu grave influis mian Esperantan karieron. Mi estis elektita prezidanto de la Esperantista Rondo *Kulturo*, fondita antaŭ unu jaro, kaj Aleksander Korĵenkov lanĉis la orientsovetian kulturan almanakon *Sezonoj*, kiu por kelkaj jaroj fariĝis podio por multaj talentaj sovetiaj literaturistoj kaj sukcesis teni neordinare indan nivelon sur la fono de la mortanta *Amikeco* kaj la sciencpretenda fiksidea *Literatura Skatolo*. Por mi ĝi estis ankaŭ lernejo kaj metiejo, kiujn mi trairis ĝis la ĉefredaktora posteno, mortigante ĝin kun la morto de Sovetunio.

Tiuj produktivaj 1980-finaj jaroj estis plenaj da interesaj aranĝoj pri literaturaj, historiaj, interlingvistikaj, esperantologiaj temoj kun multegaj eksteresperantujaj kontaktoj, proksima kunlaboro kun *Hungara Vivo* kaj *Literatura Foiro*, renkontoj kun William Auld, Perla Martinelli, Giorgio Silfer, Vilmos Benczik (kiu lasta loĝis en nia hejmo). Eble kulmina evento estis la kultura programo de uralanoj en Tallinn 1988. Kompreneble tia aktivado kaj kumulo de fortoj ebligis al uralanoj unue en la postmilita Ruslando desube oficiale registri esperantistan societon (UES), kiu laŭmerite transformiĝis ĉi-jare en asocion Ruslandan.

Pri mia ruseco; jes, mi estas klasika kampardevena ruso, kvankam laŭ la sekundaraj trajtoj mi trovas en mi mem malproksiman eĥon de tataroj. Min ĉirkaŭas la arbaraj montetoj (komie: *parma*), riveroj kun komiaj nomoj: Sylva, Lysjva, Obva,

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La kultursekcio daŭrigas la sekcion “Arkivo” per fasko da originalaj poemoj de Nikolai Lozgačev. Plurajn el ĉi tiuj poemoj (ekzemple, Bal-adon) li kantis en esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

En la supra foto Nikolai kantas okaze de la lanĉo de la poemaro “Kvarteto”, okazinta en aprilo 1996 en la redakcia palaceto de la populara revuo “Uraljskij Sledopyt” en Jekaterinburgo, kie tiam funkciis la eldonejo “Sezonoj” kaj la redakcio de “La Ondo”. Apud Nikolai sidas Aleksander Korjĵenkov (en la centro) kaj Gafur Gazizi. (Foto: Vladimir Terjoĥin).

Poemoj de Nikolai Lozgaĉev

CURRICULUM VITÆ

Junul' impetis kun scivol'
al ĉiu nov'. Sur l' vojo eka
post ĉiu paŝ' kun sanga bol'
ekkriis monden li: — Heŭreka!

Matura viro fronte al
maljust' aŭ malamiko staris
kaj antaŭ lukt' por l' ideal':
— Mi iras kontraŭ vin, — deklaris.

Oldul', konscia pri la viv'
honeste, pacon finakiris
kaj sume pri la efektiv':
— Exegi monumentum, — diris.

* * *

Vi forestas,
vi fore estas, mia milda.
Retro,
espero restas,
vi majestas
post pli ol milo da
kilometroj longa
mia pens'.

Mi penas,
mi penas vin imagi,
vidas svagi
vid-al-vide,
kor-ĉe-kore,
soifas vin avide,
senpudore.
Vin, kies manko
jam ne tolereblas.

En la anim' tenebra
suno eta —
la adiaŭa kis' —
prilumas miajn revojn.

PRIMAVERO

prima verdo
prima verŝo
prima vermo
prima vervo
prima vergo
prima verbo
prima verso
prima verko
prima vero

BAL-ADO

Iam en sonĝo aŭ real'
ĉeestis mi en flora bal',
mi flirtis kun floranta in' al flor' de floro.

Ŝi flustris — Ne forgesu min...
Pasi-anhelis ŝia sin'...
De tiam fikse tenas ŝin mia memoro.

Kapklinis ni al ĉiu par',
ni dancis en la flora mar'.
Vaglume fluoreskis perloj de lampiroj.

La kapojn turnis flarumin',
abelojn logis suĉumin',
neplukumin' incitis pimpajn kavalirojn.

Ne longas flora vivodaŭr':
ni plukas multajn sen bedaŭr',
eĉ neplukitaj velkas fine de l' sezono.

Post la petal-defal' al ni
amar' postrestas de opi',
sed ankaŭ semoj de l' esper' al novbutono.

Mi flugis kvazaŭ papili',
ĉe multaj restis sub foli',
tra multajn provojn pelis min la viv-destino.

Admiruminoj ligis min,
netuŝuminoj pikis min,
sed plu sopiras mi pri l' neforgesumino.

* * *

ĉe l pensa stagn
post nokt inkub
mi plonĝas tagen
de la urb

post kreo ĉes
mi iras tien
por min forgesi
en rutin

vizaĝa vic
rapidas preter
pala povrec
de l viv palet

facilas driv
laŭ unu kurs
sed re de l viv
mi reven kuras

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nia libroproduktado en la 2016a jaro

Ĉar ĉi-jare *La Ondo* havas multajn novajn abonantojn, estas utile memori, ke ekde 1991 ni aperigas la statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik, kiun li komencis en *Hungara Vivo*. La bazo de ĉi tiu statistiko estas la rubriko “Laste Aperis” en la revuo *Esperanto*. Ĉi tiu rubriko registras ĉiujn librojn, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro.

Tia statistiko ne estas ideala. Unue, en “Laste Aperis” estas pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj, sed nur en la koncerna jaro ekvenditaj de UEA. Tio povas doni misan bildon por la jaro. Sed la resuma statistiko por pluraj jaroj glatigas la fluktadon kaj vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, kaj pli grave: UEA vendas ne ĉiujn Esperanto-librojn, kaj en “Laste Aperis” kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj malmultekzempleraj eldonaĵoj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj aŭ lokaj renkontiĝoj.

Ekster la statistiko restas la bitlibroj, ja nun pluraj aŭtoroj enretigas siajn verkojn kaj senpage ofertas ilin al la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono. Tio malmultigas la jarrikolton de libroj paperaj. Sed ne estas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”, kaj mi do daŭrigas mian statistikadon de la Roterdama librovendejo.

Grasa jaro kaj rekorda paĝokvanto

Dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj jare, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la jara averaĝo estis 191 libroj, kaj en la ses unuaj jaroj de la nuna jardeko (2011-16) entute “lastaperis” 971 libroj, aŭ 161 libroj jare.

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2004	183	27.295
1992	205	25.789	2005	159	23.780
1993	136	18.511	2006	204	30.078
1994	188	22.078	2007	184	31.183
1995	200	23.345	2008	158	25.381
1996	232	28.637	2009	158	24.272
1997	273	27.727	2010	204	28.232
1998	208	28.769	2011	172	19.775
1999	208	24.460	2012	153	23.144
2000	235	25.869	2013	178	25.344
2001	222	31.520	2014	107	14.024
2002	174	26.451	2015	172	25.629
2003	224	28.424	2016	189	32.323

Oni povas nomi la 2016an jaron “grasa”, ĉar “Laste Aperis” listis pasint-jare 189 librojn. Pli multaj libroj (204 titoloj) lastafoje surmerkatiĝis en 2010. Sed mirinda

estas la suma paĝonombro de ĉi tiuj libroj – 32 mil 323 paĝoj. Neniam en la antaŭaj 25 jaroj la paĝaro estis tiel ampleksa. La averaĝa libro ĉi-jare estis nekutime “dika” – 171-paĝa, kaj inter la 189 registritaj libroj estis nur 19 broŝuroj malpli ol 49-paĝaj.

Al la paĝorekordo elstare kontribuis la oklingva medicina enciklopedia vortaro kun 3148 paĝoj presitaj en Kroatio sur la tre maldika “biblia” papero. Sed eble pli grava kaŭzo de la formala kresko estas tio, ke la jarkolekto 2016 de la revuo *Esperanto* kompletiĝis ne novembrofine, sed en februaro, kaj do ĝi kovras ne 12 monatojn sed pli ol 14 (pro la sama kaŭzo la nuna statistika revuo aperas en la maja, sed en la februara kajero de *La Ondo*). Supozeble, danke al la intertempa restariĝo de la aperritmo de la Roterdama revuo, en 2017 la statistiko montros malfluson.

	1991-2010	2014	2015	2016	1991-2016 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4020	107	172	189	4991
Suma paĝonombro	527.892	14.024	25.629	32.323	635.808
Nombro de la eldonintoj	1038	61	97	75	1185
Averaĝa paĝonombro de unu libro	131,3	131	149	171	134
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	9,70	12,01	12,18	12,84	10,10
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	603	14	24	20	719
Originala beletro	472	13	17	30	592
Traduka beletro	819	26	44	28	1025
Lingvistiko, esperantologio	440	15	25	23	578
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	540	11	17	28	667
Politiko, historio, filozofio, socio	394	12	30	34	547
Scienco kaj tekniko	275	2	2	5	297
Religio	198	7	7	14	249
Aliaj temoj	279	7	6	7	315

En la laŭtema tabelo ni vidas, ke instruiloj kaj tradukitaj beletraĵoj, kiuj estas la plej ofte eldonataj dum la pasinta jarcent-kvarono, ĉi-foje cedis al originalaj beletraĵoj kaj al soci-politikaj, filozofiaj kaj aliaj “soci-sciencaj” verkoj.

La senlaca Lutermano

2016. Libroj

MAS (Francio)

Fonto (Brazilo)

Espero (Slovakio)

31

17

12

2016. Paĝoj

MAS

Marka (Kroatio)

Fonto

3.358

3.148

2.664

Mondial (Usono)	12	Mondial	2.402
La Blanchetière (Francio)	10	DEC	1.735
DEC (Kroatio)	8	Libro-Mondo	1.718
Libro-Mondo (Pollando)	7	Espero	1.333
Impeto (Ruslando)	4	Wonbulgyo chulpansa (Koreio)	1.150
JEI (Japanio)	4	Podlahia Libraro (Pollando)	1.110
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	4	Exit (Rumanio)	817
S. Sarafian	4		

Escepte de 2014, kiam la unua estis *Edition Iltis*, dum la naŭ lastaj jaroj la plej aktiva eldonejo estas MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte politikajn kaj sociajn verkojn de maldekstraj aŭtoroj klasikaj kaj modernaj, kiujn ofte li mem tradukis (aperas ankaŭ eldonaĵoj esperantologiaj kaj alitemaj). Sed ankoraŭ neniam MAS havis tiel grandan jarprodukon. Kun 31 volum(et)oj Lutermano ne havis rivalojn en 2016, kaj nur unu fojon ekde 1991 estis pli multa librokvanto de unu eldonejo registrita dum unu jaro: 34 librojn aperigis la eldonejo *Libro-Mondo* de Tomasz Chmielik en 2001.

1991-2016. Libroj		1991-2016. Paĝoj	
UEA (Nederlando)	161	FEL	23.092
MAS	143	Mondial	21.266
Libro-Mondo	141	Fonto	20.072
FEL (Belgio)	127	UEA	19.716
Fonto	122	MAS	19.675
Ed. Iltis (Germanio)	116	Libro-Mondo	19.301
Impeto	113	Impeto	17.980
Mondial	102	KAVA-PECH	15.698
KAVA-PECH	92	Sezonoj	13.898
Sezonoj (Ruslando)	86	Arĥivaro E. Privat (Svislando)	12.728

En la resuma listo por 26 jaroj daŭre plej altas UEA kun 161 libroj. Sed tio estas **nur ses libroj jare**. UEA, nia plej aktiva nuntempa eldonejo, estas ege malpli aktiva ol la Pariza eldonejo *Hachette*, kiu antaŭ cent jaroj eldonis ĉ. 350 librojn dum 1901-1914 — averaĝe 25 librojn jare.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humuristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Ne plaĉas via kulturo? Prenu novan!

La staĝo okazis surbaze de la propono de la korea grupo, kiu ekde 2012 aranĝas similajn staĝojn en kaj ekster Koreio por interŝanĝo de kulturoj... (Reza Kheirkhah: *Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj Esperantistoj*= // *La Ondo de Esperanto*, 2017, №3, p. 20)

Titaniko ĉe Taranto?

Itala Esperantista Federacio organizas... veladon por esperantistoj en la pitoreska Golfo de Taranto... La velumantoj, ensorbite de la naturaj elementoj, estas en *strikta kontakto kun la maro*... (*Velado al Itala Kongreso 2017* // *La Ondo de Esperanto*, 2017, №3, p. 27)

Veturo malbelen

Juraj Bubalo... publikigis la romaneskan vojaĝpriskribon...Vojaĝo al Hidlando... (*Omaĝe al Tibor Sekelj*. Bjelovara Esperantista Societo, 2016, p. 42; rimarkis Ionel Oneț)

Fettes plu poras halucinojn

Anna kaj Dima transprenos la revuon... Aldonas Fettes: ... Ni antaŭĝojas kunlabori kun la novaj redaktoroj por realigi tiun vizion. (Gazetaraj Komunikoj de UEA, 2017, №667, <http://uea.org/aktuale/komunikoj/2017/Nova-redaktoro-paro-por-la-revuo-Esperanto>)

Lingvingaj lingvoj

En kelkaj oceaniaj lingvoj, estas kvin gramatikaj lingvoj... (André Cherpillod: *Promenante tra la lingvoj*... Courgenard: La Blanchetière, 2017, p. 33; trovis Ionel Oneț)

Homoloĝe en Ĉinio

Ĉinio ĉiam altiris min... estus interesa sperto vivi kiel fremdulo tie. Tiam oni ne vidas nur homoĝenan amason da homoj. (Komento de Al Mirinda al: Jano Klark: *La ĉina termino "laŭĵ"*, 5 nov 2012, <http://www.ipernity.com/blog/janoklark/427245>)

Persono tre grata, aŭ: Gratulo je kvadrato

Mi kore gratulas al la prezidanto de TEJO, Michael Boris Mandirola pro la gratula letero. (Trezoro Huang Yinbao, 7 feb 2017, <http://www.liberafolio.org/2017/02/05/tejo-gratulis-partianon-de-berlusconi/#comment-354>)

Kotĵetado virtuala

Antaŭ ne tre longe la rankoto cirkulis per interreto angle kaj Esperante. (Iriza: *Dioramo de "se la mondo estus la vilaĝo de cent homoj"*, <http://iriza.blog.so-net.ne.jp/2009-05-02>)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!



BANSKÁ ŠTIAVNICA (SK)

15 - 23 julio 2017

Venu sperti la plej mojoso someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu:

<http://ses.ikso.net>

